

PENTEKOSTO – 8an de junio 2014

## **KIEL LA PATRO SENDIS MIN, TIEL ANKAŬ MI SENDAS VIN – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

### ***El la Evangelio laŭ Johano 20,19-23***

**Kiam vesperis en tiu unua tago de la semajno, la disĉiploj estis kune en la vespermanĝejo, kun pordoj fermitaj pro timo antaŭ la Judoj. Subite Jesuo venis, ekstaris meze de ili kaj salutis ilin: "Paco estu kun vi!". Poste Li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon. La disĉiploj ĝojis, vidante la Sinjoron.**

**Denove Jesuo diris al ili: "Pacon al vi! Kiel la Patro sendis Min, tiel ankaŭ Mi sendas vin". Kaj, dirinte tion, Li elspiris sur ilin, kaj diris: "Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estos pardonitaj; kies vi ne pardonos, al tiuj ili ne estos pardonitaj".**

La aresta ordono estis ne nur por Jesuo, sed eldonita por la tuta grupo. Estis Jesuo, kiu el sia ŝlosilpozicio diris al la gardistoj: "Se vi serĉas min, lasu ke tiuj foriru". Jesuo estis la paŝtisto kiu donis la vivon por siaj ŝafoj. Sed nun la paŝtisto iras serĉi siajn ŝafojn, tiuj kiuj perdiĝis pro lia aresto kaj precipe pro lia hontiga morto.

Kaj Jesuo iras ilin serĉadi, por ilin rekapti. Malgraŭ tio, ke jam estis donita la anonco de la releviĝo de Jesuo, la disĉiploj restas kaŝitaj pro timo de la aŭtoritatuloj. Ne sufiĉas scii ke Jesuo releviĝis, oni devas tion sperti.

Estas tio kion diras evangeliisto Johano. Do, "*Kiam vesperis en tiu unua tago de la semajno, la disĉiploj estis kune en la vespermanĝejo, kun pordoj fermitaj pro timo antaŭ la Judoj*". La Judoj ne estas la popolo, sed en ĉi tiu evangelio ili reprezentas la ĉefojn, la religiajn aŭtoritatulojn. "*Subite Jesuo venis, ekstaris meze*", jen la loko de Jesuo en la komunumo estas la centro.

Li estas la gvidosigno. Li estas la unuiga faktoro de la tuta grupo. Tiuj kiuj sekvas, estas la unuaj vortoj kiujn Jesuo eldiras, post la releviĝo, en la

pleneco de la dia kondiĉo, kaj ĝi estas bondeziro de plena feliĉo. La vorto 'paco', el la hebrea Shalom, indikas multe pli ol nia paco, sed ĝi indikas ĉion kio kontribuas al la plena feliĉo de la homaro.

Sed Jesuo ne limiĝas al vorta anonco, al simpla bondeziro, li demonstras kial ili devas esti plene feliĉaj. *"Poste Li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon"*. Tiuj estas la neforigeblaj signoj de lia amo. La amo kiu puŝis lin doni la vivon por la siaj ne estis respondo en drama okazaĵo, sed la normala sinteno de Jesuo ene de la komunumo.

Jesuo ne intervenas dum la krizomomentoj kaj respondas per sia amo al la bezonoj de la komunumo. Sed Jesuo meze de la komunumo protektas, defendas, helpas kaj pligrandigas la amkapablon de siaj disĉiploj kiuj akceptas lian amon.

Kaj fakte la disĉiploj ĝojis. Fakte se antaŭe ili timis, nun ili ĝojas *"vidante la Sinjoron. Denove Jesuo diris al ili: „Pacon al vi!"*. Dum la unua paco estis motivita per la fakto ke la amo, diras Jesuo, kiu puŝis min doni la vivon por vi pludaŭras, la dua paco estas motivita per la fakto esti vokataj pludaŭrigi la saman agadon de Jesuo.

La paco kaj la feliĉo de la homo venas de tiu amo ricevita de Dio, kaj Jesuo montris la manojn kaj la flankon, sed ili venas ankaŭ de la amo kiu estas komunikenda, kaj pro tio Jesuo, je la dua paco, je la dua invito al feliĉo, diras: *"Kiel la Patro sendis Min"*, kaj la Patro sendis Jesuon esti la videbla manifestiĝo de lia amo, senkondiĉa amo el kiu neniu persono, kia ajn estu lia konduto, lia sinteno, povu senti sin ekskludata.

Nu, *"Kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi sendas vin"*, jen la fonto de la feliĉo. La disĉiploj, ĉiu kredanto, estas alvokata pludaŭrigi la mision de Jesuo manifesti videble la amon de la Patro. Tiu estas la fonto de la ĝojo, de la plena feliĉo. Estas do iu amo kiu estas komunikata, iu amo kiu estas ricevata de Dio, iu amo kiu estas komunikenda al la aliaj.

*"Kaj, dirinte tion, Li elspiris"*. La evangeliisto rediras la samajn agojn de Dio sur la unuan viron, kiam legeblas en la libro de la Genezo, ĉapitro 2, versiklo 7 *"Tiam la Sinjoro Dio modlis la viron per la polvo de la grundo, li elspiris en liajn naztruojn, iun vivospiron, kaj la viro iĝis vivanta estaĵo"*.

Same Jesuo. Jesuo kompletigas la kreadon, komunikas al la homo la Spiriton, tio estas la sama amkapablo kiun la Patro komunikis al Jesuo kaj kiun nun Jesuo komunikas, sed ne al ĉiuj, al tiuj kiuj akceptas lian inviton pludaŭrigi per ilia amo la amon kiun ili ricevis, tiuj kiuj iras kiel la Patro sendis Jesuon.

*"Al tiuj kiuj..."* kaj ĉi tie li ne utiligas la verbon "pardonu" sed "liberigi el la pekoj". Por "pekoj" la evangeliisto ne utiligas tion kio signifas "kulpon, eraron,

mankon", sed eraran vivdirekton. Kion volas diri la evangeliisto? Ĉi tie Jesuo ne estas donanta povon al kelkaj, sed respondecon al la tuta komunumo. La komunumo devas esti tiu lumo el kiu disradias la amo de Dio. Tiuj kiuj, vivante en la maljusto, sentas sin altirataj de tiu lumo kaj eniras ĝin partopreni, havas la pasintecon (tiu maljustan) komplete forstrekita.

Male tiuj al kiu... kaj ankaŭ ĉi tie ne estas la verbo pardoni, sed "gardi, reteni, akuzi" "*Ili restos akuzitaj*".

Kion volas diri la evangeliisto? Tiuj kiuj faras la malbonon, ne amas la lumon, sed vidante brili la lumon, ili retiriĝas eĉ pli en la ombrokonuson de la mallumo. Do ĝi ne estas povo de la komunumo, sed respondeco: briligigi la amon de Dio. Tiuj kiuj sentas sin altirataj je ĝi, tiuj havas la pasintecon tute pardonita; tiuj male kiuj vidas en tiu amo minacon por siaj interesoj, por sia avantaĝo, fuĝas for de ĝi sub la ŝirmilon de la mallumo, sub la ŝirmilon de la morto.